



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 4-a de Aprilo 2022

Ĉeestantoj: fizike – Jehoŝua Tilleman, Inbar Mor, Ŝaj Mor, Amri Wandel; zome – Dror Gaon, Mikaelo Lineckij, Ŝlomo Ŝaĥar, Gabi Zeevi. **Gastoj** – parte: Viktor Glejzerov, Jinon Meiri, Amos Ŝapira. **Eksterlandaj:** Franĉesko, Ikoss, Raja.

La Estraro esprimas siajn bondezirojn kaj sendas varmajn salutojn al nia dojenino, Kitty Sicherman, Honora kaj dumviva Membro de ELI, dumviva membro de UEA, nia mecenatino – kiu festas sian 95-jaran naskiĝtagon.

ELI kondolencas pri nia kara amikino, Claude Nourmont-Moon, kiu forpasis antaŭnelonge. Ni dediĉis unu el niaj lastaj klubkunvenoj al ŝia memoro, kaj kelkaj rakontis siajn personajn memorojn pri ŝi.

Protokolo de la pasinta (marta) kunsido estis sendita al la estraranoj kaj enreti gita.

1. Raportoj

- a) Renovigo de la kontrakto pri nia poŝtkesto. La kosto estas 744 NIS por tri jaroj. Amos Ŝapira estas petata trakti la aferon baldaŭe. **Akceptita!**
- b) Amri dissendis ĉ. 200 numerojn de IE, por ĉ. 1000 NIS.
- c) Ni ricevis du librojn (entute 8 ekzempleroj) de M. Bronŝtejn. **La pakaĵo alvenis laŭ la nomo de Amri al poŝtoŝeĵo de en Modiin. Ĉar la eldonisto ne markis la pakaĵon “donaco”, kostis 80 NIS dogane. Bronŝtejn konsentis, ke la unuaj forvendoj kovru ĉi tiun elspezon. Se ne estos aĉetontoj, ni donos la du librojn al Mikaelo Lineckij kaj al “Yad Vaŝem”.**

2. La 22-a Israela Kongreso (Jehoŝua, Amri)

- a) **La hoteloestro Miki aprobis la petojn de Amri nuligi senpage unu ĉambro (Klaŭs Leith, kiu severe malsaniĝis [kaj poste forpasis] kaj malaltigi la prezon de dupersona ĉambro al unupersona (Bronŝtejn devi nuligi lastmomente pro la milito). 11 israelanoj tranoktos en la hotelo.**
- b) Por eksterlandanoj ELI antaŭpagis al la hotelo 40% de la sumo. **Laŭ la kontrakto ELI devas pagi la restaĵon ĝis unu semajno antaŭ la dato.** Ŝlomo devos ĝiri al ili ĉ. 5,000 siklojn.
- c) **La eksterlandanoj pagos al ELI kontante post la alveno. Ni ne bezonis altigi la kotizon por eksterlandanoj pro la sufiĉa marĝeno enkalkulita.**
- ĉ) **Amri:** la 5-tagan postkongresan ekskurson mendis 8 homoj. Ili veturos en la aŭto de Amri, plus unu luita (laŭ favora prezo) aŭto. La gastejoj (en Jerusalemo, Ein Gedi, Eilat, Jordanio) jam estas menditaj.
- d) La AMO-seminario estos la unuan fojon aranĝita en Israelo far Stefan McGill.

3. Elekto de komitatano A por UEA

Manke de aliaj kandidatoj **Jehoŝua** proponas renovigi la nomumon de Amri, la ĝisnuna Komitatano-A. **Unuanime akceptita!**



4. Deklaracio de ELI pri la invado de Rusio en Ukrainion

Mikaelo ne havis rimarkojn pri la teksto. Ĝi aperis en pluraj medioj en Esperantujo (i.a. Libera Foiro kaj retlistoj de UEA).

5. Libro-magazeno por ELI

Ŝlomo telefonis al perantoj – kaj atendas la reagojn. Ni havas 100 mil NIS por tiu celo. Ĝi ne devas esti en la centro, – do malpli kosta – sed **facile** alirebla **kaj** per publika transporto **kaj per privata aŭto**. Ĝi povus havi libroŝrankojn aŭ paralelajn bretojn (ne laŭlonge la murojn), sed **laŭeble estu loko por malgranda tablo kaj kelkaj seĝoj en la mezo**.

5. Oficejo (Amri)

Laŭ Bar Vardi ne ĉiuj konsentas vendi siajn posedaĵojn, kaj pro tio la tuta etaĝo ne vendeblas. Intertempe ni ne sukcesas luigi, ĉar tro multaj oficejetoj vakas kaj atendas luanton. Ni provu en *Yad2!*

7. Dratwerejo (Ŝlomo, Jehoŝua)

a) Jehoŝua estis invitita al kunveno de la loĝejposedantoj de strato Ĥelmit en Majo, kun Cvika Brot, la urbestro de Bat-Jam. Verŝajne pro la premo de la publiko kaj la registaro li permesos la projekton de adv. Yossi Omid pri konstruo-evakuo.

b) La Dom-Komitato bitumigis la tegmenton – nia pagenda parto estas 900 sikloj.

La venonta kunsido: lunde, la 2-an de Majo 2022, je 20h00 (Alon-Turo-2, hibride)

Protokolis: Gabi Zeevi